
MA 550 skr. Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i ungdomsorganisationen TEJO och får tidningen Kontakto.

MJ 220 skr. Medlem med årsbok och nätversionen av tidningen Esperanto. I övrigt se ovan.

MG 88 skr. Medlem med "Gvidlibro", och nätversionen av tidningen ESPERANTO. Ger inte nedsatt kongressavgift.

DM 13750 skr. "Dumviva Membro" Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MA.

DMJ 5500 skr. Livsmedlem med årsbok: Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MJ; erhåller årsboken (och till fyllda 30år medlemskap i TEJO med tidningen Kontakto.)

SA 350 skr. Abonnemang av tidsskriften ESPERANTO, utan medlemskap i UEA.

KTO 210 skr. Abonnemang av tidsskriften KONTAKO, utan medlemskap i UEA.

SZ 1100 skr. Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA:

PT 660 skr. "Patrono de TEJO", betalar 3 gånger avgiften för MJ för att stödja TEJO (ger inte medlemskap): Erhåller tidningen KONTAKTO och andra utgivningar av TEJO.

Upplysningar: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå
Tel. 0910-733810 leif.holmlund@telia.com

Prenumera!

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumera på esperantotidningar för 2014. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH1303, 93138 Skellefteå
Tel 0910-733810. leif.holmlund@telia.com

Tidning	nr/år	pris kr
Esperanto	11	350
Esperanta Finnlando	5	220
Esperanto en Danio	4	121
Femina	4	270
Juna Amiko	3	144
Kontakto	6	210
La Jaro	1	85
La Kancerkliniko	5	225
La Ondo	11	423
La Ondo rete		110
Literatura Forio	6	396
Litova Stelo, provisoro ne aperas		
Monato	11	543
Monato retversio		300
Norvega Esperantisto	6	120
Oomoto, nur rete		
www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf		
Ret-ventoj		
www.esperanto.hu/eventoj/		
Scienca Revuo		180
Scienca Revuo, retversio		72

99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero 26 juli - 2 augusti 2014

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

	-2012-12-31	-2013-03-31	-2013-04-01
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1620	2025	2430
2. Icke direkt medlem i UEA	2025	2520	3060
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 83-01-01 och 92-12-31), som är medlem i UEA	810	1035	1215
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1215	1530	1845

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 93-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH1303, 931 38 Skellefteå, tel 0910-733810 leif.holmlund@telia.com

eller skrivs ut på UEA hemsida <http://www.uea.org/>

Eftersom valutakurserna är osäkra kan avgifterna komma att justeras.



Bonvenon al Zamenhof-festo en Kopenhago la 15-an de Decembro, je 14-17 horo!

Karaj samideanoj, enu festi kun ni la naskiĝtagdatrevenon de Ludoviko Zamenhof kaj la tagon de la libro.

La ĝisnuna programo inkludas la ludadon kaj la kantadon de **Jonas, Mathias** kaj **Michael** kaj eble pliaj muzikantoj.

Betty Chatterjee kaj **Jens S.Larsen** rakontos pri la membiografio de Carl Nielsen, kiu ankaŭ aĉeteblos en la DEA libroservo okaze de la festo.

Distraj kaj kulturaj kontribuoj de festanoj certe ĝojigos ne nur la aranĝantojn! Ni trinkos kafon, teon kaj ni manĝos hejmbakitajn kukojn.

Kie okazos la festo? En Kulturhuset, Tomgardsvej 35, 2400 Kobenhavn NV.


Kiom kostos la festo? Nur 20 kronojn!

Bonvolu anonci vin al Peter Wraae peter@wraae.dk, pililaste la 7-an de decembro.

I Malmö träftas vi till våren i klubben, Krone-torpsg 94, udda veckor 3-19 (15/1-7/5) kl 18.30. Meddela senast kvällen före onsdagsträffarna om du kommer så att vi kan bekräfta att det blir en träff aktuell kväll!!

E-posta till sten@agado.net eller sms-a till 073-971 80 78.

Ni ofertas nur kafon/teon dum la vesperaj kunvenoĵ. Mem kunportu aldonajojn



Språkbad 8 december

Söndag den 8 december ordnar vi en heldag då vi bara talar esperanto. Alla är välkomna, både erfarna esperantister och de som inte kommit så långt.

Preliminärt program:

- Inledning/repetition om esperanto.
- Film och/eller radio på esperanto.
- Samtal om det vi sett/hört.
- Alla deltagare får hålla en kort presentation och berätta något på esperanto. Valfritt ämne ("Din väg till esperanto" funkar bra om du inte har någon annan idé).
- Alla kommenterar det som sagts.
- Presentation av Vikipedio (=Wikipedia en Esperanto). Alla får skriva något som ska publiceras där. Skriv på dator eller för hand. Texten blir kontrollerad innan den läggs in.
- Vi spelar Scrabble/Skrablo på esperanto.

Erik och Ingvar ansvarar för språkbadet. Det är första gången, så fler idéer är mycket välkomna. Detta kanske blir ett återkommande evenemang.

Ta chansen till en heldag med bara esperanto: Var med i "språkbadet" /eller -duschen/... Samtidigt får du lära dig skriva i Vikipedio, och därmed bidra till att vårt språk utvecklas.

/Erik

Decembro

4an 18.00

Kantvespero kun Gunilla kaj aliaj kante-muloj. Kunprenu instru-menton.

8an 11-17

LINGVA BANO en EC. Vidu apartan anoncon.

11an 18.00

LUMFESTO en EC kun celebrado de Luĉio



Kalejdoskop: funderingar på svenska och esperanto till akvareller

Siv Burell har utkommit med boken KALEJDO-SKOP. Den innehåller hennes målningar och dikter (svenska/ esperanto) och är utgiven på Nomen förlag.



Hon skriver bland annat:

“Esperanto är ett roligt språk, flexibelt och nyansrikt. Jag var mer än 50 år, då jag började lära mig det. Logiken i språket fascinerade mig.”

och

“Poesin i språket upptäckte jag ganska snart. Ordföljden är mycket fri och det ger möjlighet att någorlunda parallellt få svenskan och esperanton att stämma.”

Siv Burell


Saxat från Membroletero de Gotenburgo och Adlibris.se

Franca esperantovizito en Gotenburgo 22 junio

I nga, kiu estis la gastiganto de Fransoazo, Sven kaj mi volis dum la somermeza tago montri al Fransoazo la belan arkipelagon ekster Gotenburgo. Tiam ni ne sciis ke Fransoazo suferas de marmalsano. Tamen ŝi unue diris nenion kaj prenis siajn tablojdojn kaj restis sana.

Pliaj gotenburganoj planis kunveni, sed verŝajne ili pensis ke pluvegas la tutan tempon. Male. Sur Vrångö nur pluvis dum duona minuto, kiam ni ĵus finis nian piknikon. Ni promenis tra la insulo al la ŝiphaveno. Ankaŭ la pinto, de kie la bela panoramo estas videbla, logis nin, sed la vojeto ŝajnis tro kruta kaj glita.

Reveninte al Gotenburgo ni vizitis Jarl Hammarberg. Ne nur Jarl estas artisto, sed ankaŭ lia edzino kaj filino. Do, interesa domo! Entute la tago estis sukcesa kaj poste esperantaj vortoj turniĝis en mia cerbo. Ni bezonas pli da vizitoj de ĉarmaj esperantistoj kiel Fransoazo!



Vigla pomartaĵo

En la belega vilaĝo Kivik, en Österlen, la plej suda parto de Svedio, okazas ĉiujare tradicia aŭtuna pomvendado. Post la mondkonata foirego de Kivik en julio, ĉi tio dum fino de septembro, fariĝis granda popola festo. Multaj homoj vizitas la foiron por aĉeti bongustajn pomojn aŭ aliajn fruktojn. En la tuta regiono ĉirkaŭ Kivik troviĝas grandaj ebenaĵoj kun amaso da fruktarboj.

La plej interesa vidindaĵo dum la foiro, laŭ mi, estas grandega ekspozicio kiu nomiĝas “pomvagno”, konstruita de la famaj geartistoj Emma kaj Jan Lager.

La artistoj konstruis apud la haveno, tabulon grandan, je 104 kvadrataj metroj. Kune kun kelkaj helpantoj ili fiksas ĉirkaŭ 30000 pomojn sur pli ol 62000

najloj kaj uzis malsame kolorajn pomspecojn. Laŭ takse la tuta pezo atingas ĉirkaŭ 2500 kg kaj estas kredeble la plej mondkonata pomartaĵo.

La pli frua artisto Helge Lundström, patro de Emma, jam ricevis lokon en la mondkonata libro de Guinness.

Hans Hägg,
Simrishamn.

Simple krajonkskizo de Hans Hägg



Jerzy Fornal (1926 – 2013)

JERZY FORNAL – la lasta el la famaj, profesiaj aktoroj, kiuj laboris pri la esperanto-teatro forpasis, la 31-an de aŭgusto 2013.

La 31-an de aŭgusto atingis Jerzy Fornal la lastan momenton de sia laboro en tiu ĉi mondo. Post sia multjara kaj altkvalita prezentado de diversspecaj unupersonaj prezentadoj, li trankvile endormiĝis en Varsovio en ĉeesto de sia filino Tamara. Li pasigis sian lastan tempon en la vivo kun sia filino, kiu multon faris por faciligi lian vivon post la morto de Zofia Banet Fornalowa, kiu subite forlasis nian mondon la 19-an de septembro 2012. Tio estis forta bato al ili ambaŭ.

Jerzy Fornal prezentis sian repertuaron en pluraj landoj de la mondo. Dum pluraj jaroj ekde la 1980-aj jaroj li kaj la verkisto Harold Brown travivis grandan ĝojon renkontiĝi kaj kunlabori. Ili ofte diskutis pri esperantoteatro kaj pri sia propra kuna laboro. Ili forte fekundigis la idearon kaj pensojn de unu la alia. Mi, kiu kunvivis kun Harold Brown kaj kiu aranĝis plurajn turneojn en Svedio por Jerzy Fornal ofte renkontis ilin kune kaj povis aŭskulti ilian gajan kaj kreivan interparolon pri ĉio de la monda literaturo ĝis kiel plej bone substreki kaj montri iujn detalojn en ilia propra laboro. Estis feliĉaj momentoj aŭskulti la du inteligentajn kaj kreivajn "kulturlaborantojn" naski novajn ideojn kune. Ili estis kiel du knabetoj ludi feliĉigajn ludojn, kiuj multe riĉigis la esperantan teatron kaj la esperantan kulturon. Mi esperas, ke ni ĉiuj, kiuj havis la bonŝancon travivi iliajn kreaĵojn por ĉiam portos tion en niaj koroj.

En Högsby/Oskarshamn, kie loĝis Harold Brown estis prezentitaj du premieroj, "EDUKO

DANĜERA", kiu pere de eventoj dum la franca revolucio, kiu tiam 200-jariĝis, montras ke la sinteno de la homo ne ŝanĝiĝas, kiam la jarcentoj ŝanĝiĝas. "VAGABONDO" kvazaŭbiografia prezentado sursceniĝis unuan fojon 1992 dum la Kultura SEF-kongreso en Oskarshamn.

"VAGABONDO"-n Jerzy Fornal prezentis lastan fojon dum la entombiga ceremonio de Harold Brown. Oni ŝoke travivis kiel la akso de la vivo rompiĝis. Eĉ homoj en la publiko, kiuj ne komprenis esperanton, venis plurfoje diri kiel ili ŝatis kaj "komprenis" la prezentadon. Tio klare montras la

altkvaliton de lia laboro.

Famis la prezentado de "ANIARA" (foto) verkita de la Nobelpremiito Harry Martinsson tradukita de William Auld kaj Bertil Nilsson kaj aranĝita por Jerzy Fornal de Gunnar Gällmo.

Tiu priskribas kiel oni jam dum la 1950-aj jaroj vidis nian mondon senstiratan ŝanĉeliĝi en la Universo. Vidante Jerzy Fornal prezenti ĝin oni vere travivis la lastajn horojn de nia mondo.

Fragmento el recenzo de "ANIARA" en DEFA-Bulteno (Danio), n-ro 9 1987:

"... Neniam oni aŭskultis tiom da esperantistoj diri absolute nenion dum tiam da tempo. Neniam oni aŭskultis tian esprimriĉecon, tian precizecon, tian voĉon kiel ĉe Jerzy. Ĉiuj estis tute kaptitaj de la alta arto, kiu plenigis la ĉambron, – kiam la prezento tiel finiĝis, ni apenaŭ kapablis reveni al la "ordinara" mondo, sed volis resti en la mondo, kvankam kruela kaj timiga, kiun Jerzy antaŭ niaj okuloj. Tre intima estis la travivaĵo, ĉar la "scenejo" estis tiel malgranda kaj la aktoro estis tute proksima al la publiko. Koregan dankon al Jerzy por tiu elstara vespero..."

Fragmento el enkonduko de Harold Brown al la programo de "VAGABONDO", 1992:

"... Koncize dirite 'Vagabondo' esprimas la ideon pri rajto de homo al alternativa vivo, eĉ kiam ĝi ne alportas feliĉon, sed tamen donas senton de libereco. Malgraŭ saturanta ĝin per tristo 'Vagabondo' enhavas radion de optimismo, ĉar ja ĝia heroo havas ideon; li volas semi plantojn sur betonaj aŭtoŝoseoj, kaj agante laŭ la Zamenhofa fido... eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la montan graniton - esperas fari ion bonan, pozitivan..."

"Mi memoras kaj ofte pensas pri kiam vi kaj Harold vigle interparolis pri diversaj eblecoj de esperantoteatro. Salutu Harold de mi, kiam vi renkontos lin kaj vi ambaŭ sidos sur la arĝenta rando de la nuboj denove parolantaj pri esperantoteatro! "Daŭrigu sur la nubo vian gajan interparolon, vian kreivan kunlaboron por esperantoteatro. Ne ripozu en paco! Vivu kune en ĝojo! NI MEMORU VIN!"

Kerstin Rohdin



Brönnestad – somera vojkirko

Ekde pasintjare, kiam ni aĉetis aŭton, ni havas pli da ebleco veturi en la ĉirkaŭaĵo kaj konatiĝi kun historiaj kaj kulturaj interesajoj.

Somere mi vizitis inter alie kelkajn proksimajn vojkirkojn. Tiu, kiu plej multe interesis min estas BRÖNNESTAD, situata ĉirkaŭ 70 km norde de Malmö. Vojkirko aŭ somera kirko estas agado dum kelkaj semajnoj de la lokaj eklezioj. La preĝejoj estas malfermitaj dumtage por preterpasantaj interesigantoj. Volontuloj klarigas iom pri la historio, regalas kafon kaj iam dumtage ankaŭ gvidas momenton de biblia pritraktado aŭ muziko. Kiam mi havas eblecon mi provas viziti proksimajn vojkirkojn.

La preĝejo en Brönnestad estas plejparte konata pro la freskoj pentritaj sur la volboj. La pentr-

aĵojn oni kovris dum la 17a jc per blanka kolora tavolo. Do dum pluraj jarcentoj ili ne estis videblaj, eble eĉ forgesitaj. En 1935 dum esplora laboro oni trovis ilin sed tamen daŭris ĝis 1980-81 por ke ili finfine estu videblaj denove.

Vere interesaj kaj unikaj bildoj. La plej fama pentraĵo montras Jesuon dum lia infanaĝo kiam li lernas piediri helpe de rulanta tenilo "promenhelpilo". Je mia surprizo mi komprenis ke tiu bildo montras la tempon de la pentristo, do la 15a jc! Ŝajne tiuj helpiloj ne estas moderna invento.

La unuajn partojn de la preĝejo, laŭ spertuloj, oni konstruis je la fino de la 12a jc. La unua konstruaĵo estis simpla kaj dum la sekvantaj jarcentoj oni pligrandigis kaj rekonstruis ĝin. Oni supozas ankaŭ ke je la komenco la preĝejo havis simplan horizontalan plafonon. Dum la 15a jc, post longa tempo senmilita kaj sekva prospero, la komunumoj havis eblecon grandigi kaj beligis siajn preĝejojn. Same en Brönnestad. Oni konstruis



volbojn kaj invitis artistojn, kiuj pentris ilin.

La preĝejo estas konsekrita al Sta Maria, la virgulino kaj la freskoj havas tri temojn. La ĝojoj de Maria, la afliktoj aŭ doloroj de ŝi (la suferoj de Kristo) kaj Maria inter la gesanktuloj.


La artisto estas nekonata, la stilo unika, kiun oni ne rekonas ĉe aliaj regionaj preĝejoj. El la vestaĵoj de la soldatoj kaj aliaj trajtoj de la bildoj, la spertuloj konkludas, ke la artisto(j) venas el Germanio.

Dum la mezepoko la preĝejo havis du enirejojn, unu plejparte por la virinoj kaj la alia por la viroj. Tiun kutimon oni jam longe forlasis kaj nun troviĝas nur unu komuna enirejo.

Mi proponas ke ankaŭ vi venontsomere vizitu unu aŭ kelkajn vojkirkojn. Faru paŭzon, trinku kafon, lernu iom pri la historio kaj ĝia kulturo.

Bengt Olof Åradsson

Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös



La preĝejo je la fino de la 18a jc.

Volbaj freskoj



Jesuo praktikas marŝi kun rada apogilo

Adriatika feriado en Kroatio

KIE estas Adriatika Feriado? Adriatika Feriado okazis la 3-an ĝis 10-a de aŭgusto 2013 sur la eta bela insulo Prvič en Dalmatio, Kroatio. Ĝi okazis unuan fojon kaj la nomo de la insulo signifas "la unua".

KIO estas Adriatika Feriado? Renkontiĝoj estas kreitaj de siaj partoprenantoj. En nia unua Adriatika Feriado partoprenis 24 personoj el 12 landoj, ĉiuj bezonataj, por ke bona aranĝo kreiĝu. Kompreneble la plej grava el ĉiuj – la bona plananto, aranĝanto, problemsolvanto, bezonata nabo de bone funkcia rado. Bonhumora li ĉiam aŭskultis kaj klarigis pri tio, kion ni ne komprenis, zorgis ke neniu el liaj ŝafoj perdiĝis en altaj montoj, profundaj riveroj kaj valoj. Li zorgis pri bona loĝejo kaj bona kuirsto, kiu bedaŭrinde ne kaptis fiŝon ĉiun tagon, sed tamen bonguste kuiris. Afabla personaro bone servis en la manĝejo kaj en la dormoĉambroj. Ili elturniĝis en la angla lingvo helpe al tiuj, kiuj ne parolis kroate. Ĉiuj ja estas bazo en bona renkontiĝo.

La partoprenantoj montris diversajn talentojn kaj personecojn, kio kreis agrablan etoson dum la semajno. Troviĝis LA REĜINO, kies nura apero en la ejo kolektis ĉiun atenton ĉirkaŭ

si. Ŝi estis potenca reĝino, kiun la viroj portis sur siaj manoj kaj adoris. Kun digno ŝi kapablis "porti" tion.

Troviĝis LA REĜO NEPTUN aŭ mr Hemingway, kiu dum boatvojaĝoj "stiris" la boaton de sur la busprito. Samtempe instruante knabineton pri la sekretoj de la maro kaj de la vivo. Li estis reĝo de la akvoj kaj de la virinoj. Li protektis "la brava old lady", kiu iam konis Anna Alamo, vigla eksterlanda instruistino, kiu iam instruis esperanton en Jugoslavio, Slovenio.

Ŝi tuj, jam dum ni atendis la boaton, kiu veturigu nin al la insulo Prvič hazarde ekparolis kun ŝi, kiu devenas de la sama lando, de kie venis Anna Alamo. Ŝi tre ĝojis pri tio eĉ pli, kiam ni parolis pri la signifo de la nomo Al amo.

La SLOVANINO dediĉis sian vivon al esperanto, multe laboris, instruis, diversmaniere prosperigis la internacian lingvon en sia regiono. Ĉirkaŭ ŝi, dum ŝi rakontis pri tio, radiis la sama energio, espero kaj ĝojo, kiel radiis ĉirkaŭ Anna Alamo. Krome ŝi ĵus ekstaris de malsanula lito por havi la eblecon partopreni la unuan Adriatikan Feriadon.

Ni devas ne forgesi tion, kion faris niaj antaŭuloj por prepari la vojon por esperanto, nun kiam ĝi jam vivis 125 jarojn. DOC faras grandan laboron por kolekti tion, kio estas farita. Zofia Banet Fornalowa dediĉis multon de sia vivo por kolekti kaj ordigi esperantofaraĵojn. Mi substrekas, ke estas grave konscii kaj memori pri nia historio.

Kompreneble ĉeestis ĴURNALISTINO de la enhavriĉa kaj belaspekta ZAGREBA ESPERANTISTO. Ŝi faris longan intervjuon pri "Emilo en Smolando", kiu ĵus nun datrevenas sian 50-jaran naskiĝon kiel figuro en libroformo. La intervjuo okazis sur ĵeteo ĉe la Mediteraneo en varma subluna vespero.

Por kolekti materialon al sia artikolo la ĵurnalistino preparis sin per legado de EMILIO EN SMO-

LANDO, legado de prelego pri LA VERKOJ DE ASTRID LINDGREN, kiu estas prezentita plurloke en la mondo. Ŝi jam konis la belan libron FRATOJ LEONKORO en esperanto. En esperanton estas tradukitaj krom la supre menciitaj verkoj, PIPĪ ŜTRUMPOLONGA kaj MIO MIA FILO.

Estis longa interesa interparolo dumvespera inter la ĵurnalistino kaj la tradukistino (de du el ŝiaj libroj)/prelegantino pri Astrid Lindgren.

Dumvespere okazis diversaj programeroj de plej norde ĝis sude. KRASNJOJARSKANO prezentis sian grandegan regionon froste malvarma, neĝoplana per pluraj fotoj. Li rakontis, ke ekzistas pluraj universitatoj en la regiono kaj rakontis pri kiel li mem laboras pri robotoj. La regiono de Krasnojarsk estas kvaroble pli granda ol Francio. Li rakontis kiel malvarmaj estas tie la vintroj, kiel mallongaj estas la someroj kun la famaj blankaj noktoj.

NORDLANDANINO aktore kaj vigle priskribis kiel ŝi kun siaj samlandanoj kontraŭbatalas la malvarmon en sia lando. La plej grava kaj sankta loko de la hejmo jam ekde malnova tempo estas la saŭno. Nur tie oni povas krei varmon kaj purigi sin post la malpuriga laboro en la vastaj arbaroj. Kiam oni konstruas al si hejmon, la unua parto, kiu estas konstruita estas la saŭno. Malnovtempe oni naskiĝis en la saŭno, oni mortis en la saŭno. Ankoraŭ nuntempe oni invitas gastojn por kune nude saŭnumi. La saŭno estas la ejo ĉirkaŭ kio la vivo turniĝas, kaj oni eskapas en ĝin for de la vintraj frostoj.

Alian vesperon ni vizitis la kulturplenan urbon KRAKOVON, promenadis per belaj fotoj inter la historiaj kasteloj, remparoj, katedralo kaj la fama Vendoplaco, kiu eĉ antaŭ la mezepoko estis la ĉefa vendoplaco de Meza Eŭropo por sukceso, pelto kaj multo alia.



Kelkaj el ni plej ĝuis naĝadon, aliris en la akvon ETA MARVIRINO frue, malfrue.

Kelkaj multe progresis en la lingvoscio kaj revenis hejmen kun la sento, ke ili fariĝis pli spertaj en esperanto kaj ke ili ricevis novajn geamikojn en Esperantujo. Unu aĉetis "Eduko Danĝera" verkita de Harold Brown entenante esperante verkitajn teatraĵojn, kiuj eble interesas ŝian filinon, kiu prezentas teatraĵojn en la franca lingvo.

Certe la plej granda evento estas prezentado de profesia opera-kantisto, NEVEN MRZLEĈKI, kiu lasis sian voĉon plenigi la tutan ĉirkaŭaĵon. La kantoj parte tradukitaj de li mem sonis en bela esperanta lingvaĵo.

Niaj belaj ekskursoj en naturparkoj kreitaj en miraklaj formoj per kretrokoj kaj akvoj estis belaĵoj, kiujn mi neniam vidis.

Povas okazi, ke ADRIATIKA FERIADO denove volas kolekti gastojn en la sama loko. Tiam ne maltrafu ĝin rekomendas nordlandinano, kiu estis ravita de la sudlanda etoso.

Kerstin Rohdin

Nyckelharpa = KLAVIOLONO

En la sved-esperanta vortaro de Ebbe Vilborg aperis la vorto VJELO. Tiu vorto signifas *Vev-lira*. Instrumento kun kranko. Mi kontaktis la muzikanton Martin Strid. Li scias multon pri malnovaj instrumentoj, kaj ni analizis la instrumenton *Nyckelharpa* kaj ni proponas la vorton KLAVIOLONO. Tio signifas ke ĝi estas unuvorta nomo, ne disigebla. Similas vortkonstruo de MOPEDO kaj MOTELO. Bildvortaro ne havas *Nyckelharpa* sur bildo, probable pro manko de interkonsento de nomo. Nun...

Roland Lindblom

Klaviolono farita de Eric Sahlström. Foto: Karsten Evers



Tri novaj libroj – Eldona Societo Esperanto informas

KROZE - PROZE

Literatura esearo

de Sten Johansson

158 p., 20 cm. broŝurita. 150 kr

Esearo pri verkoj kaj aŭtoroj Esperantaj, pri la Esperantaj krimromanoj kaj pri verkado kaj legado de prozo.

FLUGORANĜO RAKONTAS

de Johan Galtung kaj Andreas Galtung (ilustr)

Tradukis: Anita Dagmarsdotter.

38 p., 21 cm, broŝurita, kolorilustrita. 100 kr

Johan Galtung, pacperanto kaj profesoro pri pacoesplorado opinias ke "ĉiuj verkistoj devas verki infanan version de siaj libroj", kaj tion mem faris.

ARNE, LA ĈEFIDO

Rakonto el la vikinga epoko. Kun ilustraĵoj de Pavel Rak

116 p., 17 cm, broŝurita. Dua eldono 50 kr

de Leif Nordenstorm

En la jaro 829 loĝas Arne kaj liaj amikoj en vilaĝo en Svedio. Lia avo estis vikingo. Aperas en la vilaĝo du fremduloj, kiuj rakontas pri nova dio. Kiuj cetere estras la viroj en la vikinga ŝipo, kiu devigas la vilaĝanojn fuĝi el la vilaĝo? Ĉu liberulo kaj sklavo cetere povas fariĝi amikoj? Respondojn vi trovos en ĉi tiu libro.

DOKTOR ZAMENHOF OCH DET INTERNATIONELLA SPRÅKET

av Leif Nordenstorm & Christer Lörnemark, med förord av Daniel Tarschys

170 s., 17 cm, häftad 75 kr

Utgiven av förlaget LiteraTuro.

I denna bok presenteras språket esperanto och kulturen runt det, liksom esperantorörelsen: dess historia, någon om dess organisationer och idéerna bakom rörelsen. En del av boken är en biografi över Ludwik Zamenhof, initiativtagaren till esperanto.

VIZAĜOJ. Novelaro 2000-2009

175 p. 20 cm. 150 kr

Kolekto de 29 originalaj noveloj en Esperanto, verkitaj en la periodo 2000-2009. La verkintoj reprezentas la kvin kontinentojn.

Aliajn librojn vi trovos en nia retpaĝo:

www.algonet.se/~eldona/


Sendkostoj aldoniĝos.

Esperantoförlaget

Eldona Societo Esperanto

www.algonet.se/~eldona/

eldona@telia.com



Om esperanto och människorna kring språket

Bo Sandelin: Esperanto. Drömmen om ett världsspråk. 18 cm. 179 sidor. Inbunden. 254 kr



Det finns många böcker om esperanto. De flesta ges ut av förlag inom esperantorörelsen. Här är ett undantag: en ny bok om esperanto från ett vanligt bokförlag. Författaren Bo Sandelin är professor emeritus vid Handelshögskolan vid Göteborgs universitet. "Esperanto. Drömmen om ett världsspråk" handlar om orsakerna till att esperanto kom till, Ludwig Zamenhofs barndom och studentår, hur språket publicerades och hur det togs emot och användes i Sverige och övriga världen under olika perioder. I det sista kapitlet beskrivs hur språket är uppbyggt.

Boken är populärvetenskapligt skrivna. Den kan läsas av var och en som är intresserad av språkfrågor eller fredsfrågor. Vad skiljer då denna bok från andra böcker om esperanto? Detta är inte i första hand en bok som propagerar för

esperanto. Författaren analyserar i stället den roll esperanto har i dag med den roll som språkets skapare Ludwig Zamenhof tänkte sig att det skulle få. Esperanto fick inte snabbt rollen av ett världsspråk. Däremot visade det sig att det är fullt möjligt att skapa ett språk och att detta språk kan bli ett levande språk som används av människor för att kommunicera. Dessutom har esperanto vunnit över hundratals andra planspråk. Det är det enda planspråk som i dag används av olika grupper människor med olika syften och behov. Varför vann just esperanto? Det finns både språkliga och icke-språkliga skäl till detta.

Ett rikt bildmaterial gör boken både tilltalande och lättläst.

Leif Nordenstorm

KROZE – PROZE

KROZE – PROZE. Literatura eseero de Sten Johansson. Eldona Societo Esperanto, 2013.

La eseoj en la libro estas kolektitaj en tri partoj: "Pri verkoj kaj laŭtoroj Esperantaj", "Pri la Esperantaj krimromanoj" kaj "Pri verkado kaj legado de prozo". La unua parto estas la plej ampleksa.


Post enkonduka eseoj pri la esperanta literaturo sekvas longa (22-paĝa) eseoj pri la malmulte konata esperantista verkisto Ivan Ŝirjaev (Ivan la Malfeliĉulo, 1877-1933). Johansson faris fundajn esplorojn pri la vivo kaj verkoj de Ŝirjaev. Li lerte prikomentas la diversajn verkojn kaj montras la evoluon de la stilo de la verkisto. Siajn komentojn kaj opiniojn li prilumas per pluraj citaĵoj el la tekstoj de Ŝirjaev. La eseoj, kiu gajnis la unuan premion de la branĉo Eseo en la Belartaj Konkursoj de UEA 2012, estas tre interesa kaj vekis en mi la emon legi verkojn de Ŝirjaev.

Aliaj eseoj temas pri Julio Baghy, Stellan Engholm, KRC Sturmer, Ferenc Szilagy, John I Francis, Endre Toth kaj Spomenka Ŝtimec. En la eseoj "Bohemia amo" li komparas la romanojn "La Litomiŝla tombejo" de Karolo Piĉ kaj "Hejtaro dancas" de Eli Urbanova. Li demandas sin "Ĉu estas nura koincido, ke la du plej elstaraj amoraj romanoj de la Esperanta literaturo fontas el du

urbetoj en orienta Bohemio?" (p. 77) Li tuj diras, ke la du romanoj ne similas unu la alian. Kvankam ili havas kelkajn similaĵojn, io grava disigas ilin kaj li klopodas esplori el kio konsistas tiu diferenco. Li trovas longan vicon da komunaj punktoj sed opinias ke la diferencoj estas pli frapaj. Lia fina konkludo tamen estas ke "ambaŭ verkoj vivas per propra unika forto kaj tute ne bezonas nian komparon". (p. 94)

La dua parto de la libro, "Pri la Esperantaj krimromanoj. Kvin krimaj kvaropoj kaj kelkaj kromaj kadavroj", estas bazita sur prelego, kiun Johansson faris en la Kultura Esperanto-Festivalo de Helsinko en 2005. Hazarde mi mem ĉeestis kaj aŭskultis la prelegon, kiun mi jam tiam trovis ege interesa. Fine de la eseoj li starigas al si la demandojn ĉu ni bezonas krimrakontojn en esperanto kaj ĉu ili alportas ion valoran. Lia konkludo estas iom surpriza: "Eble la distraj, leĝeraj verkoj, kiel krimromanoj, eĉ havas same grandan signifon por la lingva evoluo kiel la vortaroj kaj gramatikoj. Do, venontfoje kiam vi trafas en diskuton pri iu neologismo, ne plu diru 'ĝi troviĝas en PIV', sed 'ĝin uzis Jano Karal kaj inspektoro Kramer!'" (p. 112)

Fine de la libro troviĝas eseoj kun diversaj aspektoj kaj konsiloj "Pri verkado kaj legado de prozo". Johansson per multaj ekzemploj, ne nur el esperantaj verkoj, helpas la legantojn malfermi la



okulojn por percepti ekzemple diversajn stiltraĵojn, manierojn krei etoson, lokigi la okazintaĵojn en tempo kaj loko kaj vivigi la protagonistojn en la rakonto.

Mi trovas la libron tre interesa kaj leginda, instiga al legado de la verkoj kaj verkistoj tie prezentitaj. Mi rekomendas ĝin, ne nur al jamaj legemuloj. Ĝi povus esti bona propono al partoprenantoj de la Internacia Esperanto-Sumoo, organizata de HORI Jasuo.

Ann-Louise Åkerlund